

# O BRASIL ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.  
NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

Número 70-72 (355-357)

Outubro-Dezembro 1943

Redator responsavel:  
Dr. Carlos Domingues

Administração e redação:  
Praça da República, 54.  
Rio-de-Janeiro. Brasil.

Gratuito para os sócios da Liga.  
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15  
respondukuponoj.

## Deka Brazila Kongreso de Esperanto Rio - de - Janeiro - Novembro 1944

Dum la ĝenerala kunsido de BRAZILA LIGO ESPERANTISTA, okazinta la 30an de Oktobro lasta, oni decidis komenci la propagandon de la Deka Brazila Kongreso de Esperanto efektiviĝonta en Rio-de-Janeiro, en dato fiksota de ĝia Estraro, al kiu oni transdonis la taskon elekti la necesajn Komitatojn. Ĝia Estraro, en kunsido okazinta je la 4a de Decembro, interkonsente kun S-ro Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, kiu akceptis la taskon prezidi la Organizan Komitaton, elektis ties ceterajn membrojn, kies nomojn ni publikigas malsupre, kaj la monaton Novembro 1944a por la efektiviĝo de tiu nacia kunveno.

### ORGANIZA KOMITATO:

**PREZIDANTO:** S-ro Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, prez. de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko", de la "Brazila Literatura Akademio" kaj de la "Historia kaj Geografia Instituto de Brazilo" kaj eksministro por Eksterlandaj Aferoj.

**UNUA VICPREZIDANTO:** Prof. Lourenço Filho, direktoro de la "Nacia Instituto de Pedagogiaj Studoj" kaj membro de la "Nacia Konsilantaro de Edukado".

**DUA VICPREZIDANTO:** S-ino Ana Amélia de Queiroz Carneiro de Mendonça, prezidantino de la "Domo de la Brazila Studanto" kaj eksprez. de la "Brazila Edukada Asocio".

**TRIA VICPREZIDANTO:** D-ro Carlos A. Guimarães Domingues.

**ĜENERALA SEKRETARIO:** S-ro Ismael Gomes Braga.



S-ro Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, prez. de la "Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko" kaj eksministro por Eksterlandaj Aferoj.

**UNUA SEKRETARIO:** D-ro Mário Ritter Nunes.

**DUA SEKRETARIO:** F-ino Maria Amaral Malheiro.

**TRIA SEKRETARIO:** F-ino Maria da Luz Costa.

**KASISTO:** S-ro Délio Pereira de Souza.

**HELPKASISTO:** F-ino Iraní Baggi de Araujo.

**SUBKOMITATO POR FESTOJ, EKSKURSOJ, PROMENADOJ KC.:** Prezidanto — Prof. João B. de Mello e Souza. Membroj — S-ino Carolina Vaz, F-inoj Rosa Amaral Malheiro, Débora Amaral Malheiro kaj Iracema Alvares Coelho kaj S-ro Nelson Pereira de Souza.

**SUBKOMITATO POR GAZETARO, EKSPOZICIOJ KAJ PROPAGANDO:** Prezidanto — S-ro Diderot Freitas. Membroj — S-roj Octaviano da Silva Lopes, Mozart Barbosa Cópio, Alencar Bourguignon Beiriz, Onézimo da Costa e Faria kaj José Barroso Junqueira.

Baldaŭ la Organiza Komitato verkos la Unuan Cirkuleron kaj ĝin dissendos al ĉiuj konataj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto loĝantaj en Brazilo kaj ankaŭ al eksterlandaj esperantistaj societoj kaj konataj samideanoj.



**ATENTU!**

La Ĝenerala Sekretario de "Internacia Esperanto-Ligo" sciigis nin, ke la kotizoj en 1944 estos samaj kiel en 1943, malgraŭ plialtiĝo de la kostoj; ke la jarlibro kaj la gazeto aperos kiel kutime, sed estas ebleco ke ili enhavos iom pli da paĝoj; ke ni havigu la kotizojn kaj ensendu ilin kiel eble plej frue, ĉar nuntempe la membraro rapide kreskas, kaj, kvankam ĝi provas antaŭvidi la bezonatan kvanton, estas ebleco ke malfruaj pagintoj ne ricevos la presajojn.

**BRAZILA LIGO ESPERANTISTA**

## Brazila Ligo Esperantista

Je la 30a de Oktobro lasta, ĉe la sidejo de la "Societo de Geografio de Rio de Janeiro", okazis ĝenerala kunside de BRAZILA LIGO ESPERANTISTA, prezidita de s-ro ing. A. Couto Fernandes, dumviva prezidanto, kaj sekretari ta de s-roj Prof. João B. de Melo e Souza kaj A-ro Mário Ritter Nunes kaj f-ino Iraní Baggi de Araujo kun la ĉeesto de la reprezentantoj de la jenaj filiitaj grupoj: Brazila Klubo "Esperanto", Esperanta Grupo de Bahia, Pernambuka Esperanto-Asocio, Esperanta Asocio de Rio-Grande-do-Norte, Grupo Esperantista "Humberto de Campos", São Paulo Esperanta Klubo, Grupo Esperantista "Francisco V. Lorenz", Esperanto-Rondeto de S. Sebastião kaj Associação Esperantista do Meyer, kaj de diversaj liganjoj.

Post la legado kaj aprobo de la antaŭa protokolo la prezidanto faris resumon de la laboroj de la Ligo dum la lastaj monatoj kaj deklaris, ke estas tre kuraĝigaj la sciigoj ricevita el la eksterlando, precipe el Anglujo, Svedujo, Svisujo, Usono, Argentino kaj Aŭstralio, kaj ke eĉ en la landoj okupitaj de Germanujo la propagando de Esperanto ne ĉesis. Li montris la oportunecon komenci la propagandon de la Deko Brazila Kongreso de Esperanto kaj prezentis proponon subskribitan de la ligestaranoj, por ke oni transdonu al ili la taskon fiksi la plej konvenan daton por ĝia efektiviĝo en tiu ĉi ĉefurbo kaj elekti la Organizan, Honoran kaj Protektantan Komitatojn. La ĉeestantaro aprobis tiun proponon kaj aklamis la nomon de D-ro Getúlio Vargas por esti la Alta Patrono de la Kongreso.

Laŭ propono de s-ro Délio Pereira de Souza, prezidanto de "Associação Esperantista do Meyer", oni decidis, ke estu memorigata per literatur-muzika festo la naskiĝa datreveno de D-ro L. L. Zamenhof, okazonta la 15an de Decembro. La prezidanto invitis Prof. Melo e Souza por fari paroladon en tiu festo kaj nomis f-inojn Rosa Amaral Maheiro kaj Iracema Alvares Coelho kaj s-ron Délio Pereira de Souza por ĝin organizi.

S-ro Ismael Gomes Braga faris konsiderojn pri la problemo de lingvo internacia, montrante per trafaj argumentoj, ke nur neŭtrala lingvo povas okupi tiun rolon kaj neniam iu el la naciaj lingvoj. Neniu petinte la parolon la prezidanto fermis la kunsidon.

## Pan - Americanismo

Trecho do artigo "O Instituto Geográfico e Estatístico e os Problemas de Base do Brasil", da autoria do Dr. M. A. Teixeira de Freitas, Presidente do Instituto Inter-Americano de Estatística — in "Estatística", órgão do mesmo Instituto — n.º 2, junho de 1943.

Por fim, apontamos o melhor caminho para a verdadeira e definitiva confraternização dos povos americanos, — quem sabe se não chegarão a formar amanhã a Confederação das Repúblicas Unidas da América? — a adoção de uma língua auxiliar comum, que só pode ser o Esperanto. O Instituto (\*) já o adota e o utilizará cada vez mais, numa demonstração prática da sua eficiência. Não se pode esperar que os latino-americanos aprendam o inglês de maneira bastante geral para que se possa utilizar correntemente tal idioma no entrelaçamento intensivo das relações entre os povos das três Américas. Tão pouco se poderia pensar em que os norte-americanos pudessem aprender em massa, como seu segundo idioma, o espanhol ou o português. E assim teremos sempre uma barreira intransponível se não recorreremos ao idioma auxiliar. Pela sua facilidade, este poderá ser aprendido por todos os povos da América. Essa aprendizagem, poderosamente ajudada ainda pelo grande número de radicais latinos e saxônicos que o Esperanto possui, se fará suavemente, desde a escola primária. Mas realiza-la-emos também na melhor disposição de espírito, porque o nosso esforço nesse sentido não estará implicando a submissão de uma parte das nossas populações a uma criação biológica e psicológica do outro grupo, o qual, assim, viesse, pelo uso continental de sua língua entre povos diversos, a exercer ascendência e a ocupar situação privilegiada, em detrimento daquela real e efetiva confraternização das Nações Americanas, que se há de realizar em condições absolutamente iguais e de inviolável respeito mútuo.

Artificial é o Esperanto, não há dúvida. Mas por isso mesmo ele se impõe, pois como tal será um idioma neutro e não tenderá nem a sobrepor-se às línguas nacionais, nem a obliterar-lhes as perduráveis características que lhes deram nossas heranças, nossa história, nossas contingências mesológicas e raciais. Demais disso, não se podem conceber senão equiva-

lentes e equitativas as transigências que os dois grupos étnicos precisam reciprocamente fazer-se, desde que se empenhem, sob a inspiração de um alto e generoso pensamento de concórdia e fraternidade, na realização do mais belo destino a que possam aspirar, em conjunto, os habitantes de todo um continente. Os anglo-saxões adotariam o sistema métrico, acompanhando os povos latinos. Os hispano-americanos e os luso-americanos submeteriam, da sua parte, seus padrões monetários nacionais às mesmas características do dólar-ouro. E, unânimes, as Nações da América procurariam a intercomunicação espiritual, que só uma fala comum pode dar, adotando a língua auxiliar das suas línguas nacionais, ensinando para isso, desde a escola primária, um idioma neutro, fácil, rico e belo, como outro não existe — o ESPERANTO.

(\*) O autor refere-se ao Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística.

### BIRDETO KAJ KNABINO

(Ĉeĥa popolkanto)

Kion diras la birdet'  
sur silik' sidanta?  
Ke paliĝas la knabin'  
knabon ametanta.

Eksilentu, ho birdet',  
tute vi ne pravas;  
ĉar mi knabon amas, kaj  
ruĝkoloron havas.

(Esperantigis Francisco V. Lorenz.)

### RIDO KAJ PLORO

José Asunción Silva

(poeto kolombia).

Ni ambaŭ ridis tre je iu tago,  
ni ridis kun humoro;  
la rido estis brua, tamen baldaŭ  
ĝin anstataŭis ploro.

Pli poste ambaŭ ni je iu nokto  
tre ploris pro doloro,  
kaj tiuj larmoj, jen, postlasis ĉarmon  
misteran en la koro.

Sopirojn veajn naskas la orgio  
ĉe l' plad' kaj tas' regalaj,  
kaj en la akvo sala de la maroj  
formiĝas perloj palaj.

(El la hispana lingvo esperantigis  
Francisco Valdomiro Lorenz.)

# 84a NASKIĜA DATREVENO DE ZAMENHOF MEMORIGA KUNVENO

BRAZILA LIGO ESPERANTISTA. Iau propono de "Associação Esperantista do Meyer", decidis festi la nunjaran naskiĝan datrevenon de D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, la genia kreinto de la internacia helplingvo Esperanto, per literatur-muzika kunveno, kiu okazis la dek-kvinan de Decembro, ĉe la luksa salono de la Kolegio Petro II, ĝentile cedita de ĝia direktoro, D-ro Fernando Raja Gabaglia. La festo komenciĝis per ludado sur fortepiano de la brazila kaj la esperantista himnoj brile farita de F-ino Teresinha Mello e Souza, kiujn la multenombra ĉeestantaro starante aŭdis kaj entuziasme aplaudis.

La prezidanto de la Ligo, S-ro A. Couto Fernandes, sciigis la ĉeestantojn, ke jam komenciĝis la laboroj por la efektiviĝo de la Deko Brazila Kongreso de Esperanto, okazonta en tiu ĉi ĉefurbo en la monato Novembro 1944a, kaj legis la nomojn de la membroj de la Organiza Komitato de tiu nacia kunveno.

Prof. João B. de Mello e Souza, ĝenerala sekretario de la Ligo, faris ĉarman paroladon, al kiu li donis la titolon "Kiel mi vidis kaj konis Zamenhof'on". Li deklaris, ke restos neforigeble gravurita en lia memoro la interparoladeto, kiun li havis en Vaŝingtono kun tiu granda bonfarinto de la Homaro, kies vivo certe la estontaj historiistoj trastudos. Li citis la nomojn de ses aliaj brazilaj esperantistoj, kiuj havis, kiel li, la grandan plezuron koni Zamenhof'on, el kiuj du, D-roj Benjamin Camozato kaj Agenor de Miranda, ĉeestas la kunvenon. Poste li parolis pri la ora medalo, kiun li ricevis dum la okazanta Universala Kongreso de Esperanto, kiun li partoprenis kiel oficiala reprezentanto de la brazila Registaro, devenanta de poezia konkurso pri la Universala Frateco. Li konfesas sian profundan impreson antaŭ la supereco de Zamenhof, kies morala nobleco elmontriĝas ĉe ĉiu frazo, ĉe ĉiu dirata vorto, kaj dum longaj silentoj. Neniu malpli nobla esprimo, neniu malbone pripensita vorto, neniu banala penso eliĝis el liaj lipoj. Oni pli sentas ol komprenas, ke li estas Spirito supera al la homa normalo. Li finis sian paroladon, kiu tre plaĉis al ĉiuj, deklamante kelkajn versojn de la belega poezio de Zamenhof titolita "Sub la verda Standardo".



D-ro L. L. Zamenhof

Poste la knabineto Dulce dos Santos Gomes entuziasme deklamis la poezion de Gonçalves Dias — Kanto de l' Ekzilo —, tradukitan esperanten de S-ro V. Lorenz, kaj la poezion "Laŭdo al la nova Verbo", portugale verkatan de Murilo Araujo.

Ĉe la dua parto de l' programo F-ino Rosa Amaral Malheiro lerte kaj senteme ludis fortepiane la jenajn muzikojn: "Granado", de *Albeniz*, kaj "Minha Terra", de Barroso Neto; kaj F-ino Yara Alvares Coelho kantis, en Esperanto, per sia forta kaj agrabla voĉo la kantojn: "Koleron for", de *Schumann*, kaj "Serenado", de *Maria T. Bird*, usona komponistino. Sin akompanis S-ino Delvair Silva.

Ekstre de la programo kaj invitive de prof. Mello e Souza, kiu lin prezentis al la ĉeestantaro, la konata pianludisto S-ro Max Gil, kiel honorigon al Pollando, kie naskiĝis Zamenhof, majstre kaj viglece ludis la jenajn muzikojn: la "Preludo", de *Rachmaninoff*; kaj "Polonaise", de *Chopin*. Li finis sian ludadon per la "Pulĉinelo", de *Vila Lobos*.

La prezidanto legis telegramon, k'un li ricevis de S-ro Tadeu Sjewronski, Ministro de Pollando, per kiu li senkulpigas pro tio, ke li ne povis ĉeesti la kunvenon memorigan de la naskiĝa datreveno de Zamenhof, granda filo de Pollando, kaj sciigas, ke li kore aliĝos al la justa honorigo al li farita.

Fermente la kunvenon la prezidanto prezentis la salutojn de la Ligo al la du malnovaj esperantistoj S-roj D-ro Benjamin Camozato kaj Francisco Falcão, kiuj, akompanataj de siaj edzinoj,

vizitas nian ĉefurbon, kaj dankas la personojn, kiuj per sia partopreno brifigis la intiman feston, kaj la multenombrian ĉeestantaron, konsistantan el esperantistoj kaj simpatiantoj al Esperanto. Al tiuj ĉi li faris alvokon, por ke ili aliĝu al tiu paca movado kaj venu kunlabori por tiu bela idealo de amo kaj frateco, kaj al tiuj li petis, ke ili vigle kaj entuziasme daŭrigu la propagandon de Esperanto ĝis ties fina venko, ĉiam rememorigante la belajn konsilojn de Zamenhof en sia majstra poezio "La Vojo", el kiu li deklamis kelkajn versojn.

Sidis ĉe la prezidanteca tablo, krom la prezidanto, S-roj Mello e Souza, A. Caetano Coutinho kaj Ismael Gomes Braga kaj F-ino Iraní Baggi de Araujo.

Reprezentigis ĉe tiu kunveno la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, la Brazila Turisma Klubo, la Brazila Edukada Asocio, la Brazila Spiritisma Federacio, la Brazila Spiritisma Ligo, kaj la Eksterulejo Mello e Souza.

Sendis dankan kaj salutan telegramon al Brazila Ligo Esperantista S-ro D-ro Gustavo Capanema, Ministro por Edukado kaj Saneco, kaj salutan leteron la Kristana Asocio de Junuloj.

La gravaj jurnalaj "Jornal do Comércio", "Jornal do Brasil", "Diário de Notícias", "A Vanguarda", "Correio da Manhã", kaj aliaj donis sciigojn pri tiu kunveno.

La stacioj de "Rádio Nacional", "Rádio Vera Cruz" kaj "Rádio Transmissora" disradiis la programon de la kunveno. Ĉe la unua, dum la gimnastika horo, kiun direktas la granda amiko de Esperanto, S-ro Osvaldo Diniz Magalhães, oni ludis kaj kantis la esperantistan himnon.

La "Associação Esperantista do Meyer" festis la naskiĝan datrevenon de la aŭtoro de Esperanto per Zamenhofs Semajno, en kies tagoj okazis jene: aŭdado de diskoj de "Lingua-fone" kun paroloj de S-ro Arnaldo G. Pires, ekspozicio de poŝtkartoj kaj paroladeto de S-ro A. Caetano Coutinho, legado de poezioj de Zamenhof farita de ĝia prez., S-ro Délio Pereira de Souza; ekspozicio de gazetoj kaj revuoj esperantistaj kun klarigoj donitaj de S-ro Haroldo Leite Pinto kaj elmontro de korespondaĵoj farita de S-ro Octaviano S. Lopes, ĝenerala sekretario.

## NI PRETIĜU

La milita situacio tute aliĝis lastatempe, kaj kvankam ni ne povas antaŭvidi kiam ĉesos la batalado, ni povas almenaŭ esperi ke tio alproksimiĝas. Kiam ĝi alvenos ni devas esti pretaj uzi nian tutan forton por antaŭenpuŝi nian movadon. En Britujo oni nun pensas pri ĉiaspecaj timoj por "plibonigi la meĉadon kaj certigi daŭran pacon", kaj granda nombro da personoj interesiĝas pri la problemoj de internacia lingvo. Kredeble la situacio estas iom simila en aliaj landoj.

Pro la longa tempo bezonata por internaciaj komunikaĵoj oni ne povas nun aranĝi grandskalan internacian propagandon, sed tio venos. Tamen, ni povas jam nun ekpretigi la organizaĵon. Ni povas pligrandigi la reton de delegitoj; en ĉiu grava loko kie ne estas delegito sed estas kompetenta Esperantisto, tiu devus proponi sin por la ofico al sia landa organizaĵo aŭ Ĉefdelegito. Aŭ, se vi konas tian kompetentan personon, vi proponu lin. Fakaj delegitoj devus ankaŭ ekzisti, kie ili nun estas, precipe tiuj por komerco kaj instruado, ĉar tute certe en tiuj sferoj estos multo farenado.

Fakaj bezonoj necesigas la pretigon de taŭgaj fak-terminaroj. Tiuj kiuj ni prezentis al niaj membroj trovis bonegan akcepton, kaj la *Radia Fak-terminaro*, kiu aperos en la dua parto de la jarlibro, certe plaĉos al multaj. Ni bezonas helpantojn en la pretigo de aliaj fak-terminaroj, ekzemple: por inĝenieroj ĉiuspecaj, por metalurgio, por minejoj, por diversaj sciencoj, por diversaj butikoj, por endoma laboro, kaj por multaj aliaj celoj. Certe ekzistas multaj kompetentaj Esperantistoj, kiuj povus helpi en la kompilado de tiaj terminaroj, sed ili estas nekonataj aŭ iom sinkaŝemaj! Ni petas, ke ili informu nin pri sia preteco kunlabori.

Jam ni komencas senti la alproksimiĝo de pli bonaj tempoj. Nia membraro kreskas, kiel oni vidas laŭ la statistiko en la Oficiala Informilo, sed eĉ pli trafa estas la plibonigo en nia financa stato. Estas jam certe, ke denove ni ne havos deficiton, kaj eĉ estas espero ke ni povos plue malpliigi la deficiton de la antaŭaj jaroj. De nun, ĉiuj donacoj ricevitaj en la nuna jaro iros al tiu celo. Jam tiu cifero malpliigis de £1500 ĝis £1174. Ĉu ne estus belega bonveno por la prezidanto kaj Komitato je ilia reveno, se ni povos montri al ili ke nia bilanco estas kontentiga?

(El "Esperanto Internacia", oficiala organo de "Internacia Esperanto-Ligo"-Vol. 7, n. 7-8 Julio-Aŭgusto 1943).

## Esperanto e Inglês

Com o progresso moderno torna-se urgente que o mundo tenha uma língua neutra auxiliar que seja aprendida por todos os homens ao lado de sua nacional. A ciência, o comércio, a indústria, a religião, a cultura, o turismo reclamam cada dia mais esse instrumento e os governos mais cedo ou mais tarde terão que celebrar acordos para a solução do problema. Nesse sentido o Brasil já tem dado passos muito significativos e ocupa mesmo lugar de honra na opinião universal. O assunto é de tal importância que há mais de três séculos vem sendo estudado por grandes pensadores, como Comenius, Descartes, Leibnitz, Sílvia Romero, Medeiros e Albuquerque, Afonso Celso, e uma infinidade de outros. Podemos dizer que o debate durou três séculos a encerrar-se, mas está encerrado. Ficou decidido pela discussão paciente do tema que a língua auxiliar não pôde ser nenhuma das línguas vivas, porque todas as nações do mundo reagiriam contra aquela cujo idioma fosse o adotado. Por instinto natural de conservação todas as nações se insurgem contra a imposição de uma língua estrangeira aos seus filhos. A adoção de uma língua estrangeira como internacional destruiria todas as nações do mundo em benefício de uma única, porque com a língua vão as idéias, a supremacia política e econômica, a religião, os costumes.

Por motivos políticos, a língua auxiliar internacional tem que ser absolutamente neutra, como é o Esperanto; porém outro motivo imperioso existe a favor do Esperanto e contra o inglês: é a dificuldade de aprender-se e empregar-se o inglês como língua falada. Pronúncia irregularíssima, vocabulário heterogêneo e desmesuradamente grande, repleta de idiotismos escuros, a língua inglesa é realmente difficilíssima e apesar de ensinada obrigatoriamente em nossos ginásios e escolas de comércio há um século, poucos no Brasil a sabem suficientemente para empregá-la em discursos, programas de rádio, livros. Muito poucos compreendem um discurso radiofônico em inglês, mesmo entre os brasileiros que sabem ler a língua, tais e tantas são as diferenças entre a linguagem escrita e a falada.

Quando o brasileiro é forçado a falar inglês, se ele não viveu algum tempo em país onde se fala esse idioma, fala mal. Justamente o contrário dá-se com o Esperanto. Facilímo, absolutamente regular, mesmo sem mestre todos o aprendem suficientemente e tem prazer em falá-lo. Muitos norte-americanos esperantistas tem visitado a nossa Liga e convivido conosco, deixando as mais encantadoras impressões.

Há mais de quatro anos, o nosso Conselho Nacional de Educação estudou o assunto de língua auxiliar internacional e decidiu que o Esperanto deve ser ensinado obrigatoriamente em nossas escolas públicas. O Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística estudou o assunto e introduziu o ensino obrigatório do Esperanto em seus cursos para estagiários, e o emprega como língua auxiliar em seus impressos e correspondência.

Se bem que o Esperanto ainda não seja ensinado nas escolas, esteja entregue somente aos grupos privados e aos autodi-

## GONÇALVES DIAS

Do livro "Bibliografia de Gonçalves Dias", compilado por M. Nogueira da Silva, da Coleção B. 1, editado pelo Ministério da Educação e Saúde, "Instituto Nacional do Livro", extraímos o seguinte: "34 — *Kanto de l' Ekzilo*. Letra da *Canção do Exílio* traduzida para o Esperanto por Fr. V. Lorenz, música de Querino de Oliveira. Paris. Imprimerie Esperantista V. Polgar — Polizer, s. d. — N. S."

Na última página, em papel *couché*, vem uma fotografia do conjunto de músicas de vários autores nacionais e estrangeiros sobre letras de Gonçalves Dias, do qual consta aquela música.

Em festas de propaganda do Esperanto foi a música de Querino de Oliveira cantada por diversas cantoras patricias, entre as quais as Sras. Nícia Silva e Heloisa Mastrangioli e a Senhorita Dyla Cruz, e, em Washington, por ocasião do 6.º Congresso Universal de Esperanto, por uma americana, tendo sido todas acompanhadas pelo autor, de saudosa memória.

## ESTONTECO DE LA HOMARO

De l' Homar' l' estonteco  
Estos brila kaj paca tute certe!  
Kial fuŝos la hom' ĉiam mallerte  
Sian propran vivadon? Tiu speco  
De sovaĝaj la nunaj malaperos!  
Planedo nia spacon ja konkeros  
Plenan de steloj, de stelar' tenata!  
Kaj la homar', malsata  
Je lumo, je trankvilo, je la amo  
— La anima nutraĵo, tiu flamo  
Sanktega, eĉ mem dia —  
La homar' tiutempe fratoj estos,  
Kiu, dankante Dion, Amon festos  
Regantan vere en rond' ilia!  
Ne plu perforto! Globon ja ne skuos  
Plu homa kataklismo! Ne detruos  
Ĝian belan supraĵon la bataloj  
Inter homaj ŝakaloj  
Mordantaj sin en la glueca ŝlimo!  
Tiam ŝvebos de l' homo la animo  
Kvazaŭ for de la mond', en alta sfero  
Ne skuata de l' vento de l' malpaco!  
Kaj en la blua spaco  
Plia stelo ruliĝos: Paca Tero!

28-4-31 Porto Carreiro Neto

(Pociaĵo premiita ĉe konkurso de "Heroldo de Esperanto" pri la suprotemo). (El "Brazilia Esperantisto"-Aprilo-Aŭgusto 1932).

datas, a literatura em prosa e verso que aparece em Esperanto demonstra que por toda a parte há poetas e prosadores que manejam a língua com elegância e perfeição, o que não fazem em inglês e não o fariam em nenhuma língua estrangeira por sentimento patriótico, mesmo que conseguissem aprendê-la suficientemente.

## NEKROLOGO

### D-RO DEMÓCRITO ROCHA

Je la 30a de Novembro lasta mortis en Fortaleza, Ceará, nia klera kaj fervora samideano D-ro Demócrito Rocha, direktoro kaj posedanto de la grava ĵurnalo "O Povo". Li okupis la oficon de telegrafisto kaj dum kelkaj jaroj reprezentis sian naskiĝan Ŝtaton ĉe la Federacia Deputitara Ĉambro. Li esperantiĝis antaŭ 30 jaroj. Kunfondinto kaj unua sekretario de "Esperanta Klubo Cearense", fondita en Decembro 1912a, kaj poste ties prezidanto, li fariĝis prezidanto de "Nord-brazila Esperantista Unuiĝo", fondita en Junio 1922a. Li estis delegito de nia nacia Ligo dum la 6a, 7a, kaj 8a Brazilaj Kongresoj de Esperanto kaj de 1939 li okupis la oficon de delegito de IEL.

Ĉeestinte la 9an Brazilan Kongreson de Esperanto, okazintan en Rio de Janeiro dum la monato Novembro 1936a, revenante al Fortaleza li vekis la dormantan Esperanto-movadon en Ŝtato Ceará. Li malfermis diversajn kursojn de Esperanto, el kiuj ni citas tiun en Instituto Lourenço Filho, kaj faris propagandon de tiu lingvo per la kolonoj de sia ĵurnalo, helpis la fondon de "Katolika Esperantista Klubo", kiu aliĝis al B.L.E., en kies animaro figuris lia filino f-ino Lúcia Rocha. Unu monaton antaŭ lia morto li verkis du bonajn artikolojn elmontrante, ke nur Esperanto taŭgas por internacia lingvo. Estas do granda perdo por la esperantista movado la morto de tiu sindona samideano.

Al lia familio niajn tre sincerajn kaj varmajn kondolencojn en la nomo de la tuta brazila esperantistaro.

Pacon al liaj cindroj!

### LUÍZ O. GUILLON RIBEIRO

Je la 26a de Oktobro nunjara mortis D-ro Luiz Olímpio Guillon Ribeiro, prezidanto de la "Brazila Spiritisma Federacio", kaj direktoro de "Reformador".

Li naskiĝis en Ŝtato Maranhão je la 17a de Januaro 1875a. Li komecis siajn unuagradajn studojn ĉe la Seminario de S. Luiz, ĉefurbo de tiu Ŝtato, eniris en la Militan Lernejon, kie li restis tri jarojn, kaj poste en la politeknikan Lernejon, kie li fariĝis Civila Ingeniero. Kiel oficisto de la Senata Sekretario, li okupis ĉiujn gradajn oficojn ĝis la plej alta, tiu de Direktoro, en kiu li emeritiĝis. En

la jaro 1911a li fariĝis spiritisto kaj multe laboris por spiritismo.

Granda amiko de S-ro Ismael Braga, li akceptis Esperanton kaj dank' al la apogo, kiun li donis al ĝia movado, la Federacio povis vigle labori por Esperanto kaj eldoni grandan nombron da libroj en kaj pri Esperanto kaj propagandajn broŝurojn kaj prospektojn. Li mem lernis la helplingvon kaj tradukis portugallingven la lernolibron "Manuel de Esperanto", kies eldono dependas de la akiro de l' eldonrajto.

Tial la morto de D-ro Guillon Ribeiro estis sentebla perdo por la esperanta movado.

Al lia familio niajn sincerajn kondolencojn.

## SEP VANGOFRAPOJ

Ni ĵus ricevis de la "Internacia Esperanto-Ligo" ekzempleron de interesa romano titolita "Sep vangofrapoj", verkita de Karlo Aszalányi kaj esperantigita de Ladislau Spierer. Ĝi estas la sepa volumo de la bonega kolekto da libroj "Epoko", kiu enhavas 148 paĝojn, kaj estas presita sur bonkvalita papero kaj kartone bindita. La aŭtoro, kiu apartenas al la verkistoj de la nova generacio, krom romanoj verkis por la teatro kaj por filmo. Ankaŭ tiu ĉi romano estas filmigota de UFA. Kvankam la aŭtoro estas hungara, la sceno de la romano okazas en Anglujo. Lia nomo jam estas konata de la esperantistoj, ĉar li tradukis la popularan verkon *Knaboj de Paŭlo-Strato*. Li mortis la 8an de decembro 1938a en sia trideka jaro pro aŭtomobila akcidento. Havebla ĉe Internacia Esperanto-Ligo -- Heronsgate, Rickmansworth. Anglujo. Prezo: 3 ŝilingoj -- Poŝto 3d.

## ELEMENTOS DE GRAMATICA

Ni ricevis ekzempleron de tiu hispanlingva lernolibro de D-ro Quiña González, eldonita en Buenos Aires, Argentino. Ĝi enhavas multe da ekzercoj kaj vortaretojn Esperant-hispanan kaj Hispan-Esperantan. Ni trovas ĝin bona. Tamen ni ne ŝatis la forigon de la litero H, ĉar tio estas rompo de la "Fundamento de Esperanto", la uzadon de la sufikso IO, k'iu la AKADEMIO ESPERANTISTA kaj la LINGVA KOMITATO formale malakceptas kaj IEL ne uzas, kaj, fine, la mksadon de hispanaj kaj esperantaj vortoj en la sama frazo. Tiu novaĵo certe kaŭzos konfuzojn al la novaj lernantoj.

## ARGENTINA ESPERANTISTO

